


EKE



esperanto

**Kunveno: merkredon la 19an de junio 2019a
je la 20.00 h. en “De Uitwijk”,
Generaal Pattonlaan 124, Eindhoven.
tel. 040-2450590.**

Tatoeba.org

Tatoeba.org estas retejo en kiu oni povas trovi grandan kvanton da frazoj, en pluraj lingvoj. La frazoj estas ligitaj al siaj tradukoj en aliaj lingvoj. Tiel la retejo funkcias kiel datumbazo de tradukoj.

En la programo, *Micha* volas fari 3-4 grupojn, kiuj konkurencos unu kontraŭ la alia. La ĉefa celo estas, kune ekkoni la ilon nomatan *Tatoeba*, kaj uzi ĝin por traduki ekzemplojn el la nederlanda.

Programo

1. Lerni kiel uzi la retejon *Tatoeba*.
2. Aldoni realajn ekzemplojn el nederlandaj fontoj (pensu pri: *nos.nl*, *Elsevier*, nederlandaj klasikaĵoj, ktp.).
3. Krei defiojn unu al la alia, por fari tre malfacilajn frazojn.
4. Kompari rezultojn de la grupoj.
5. Korekti erarojn.
6. Diskuti stilajn ideojn.
7. Krei listojn en *Tatoeba*.

Por la kunveno ni bezonos (teko)komputilojn. *Micha* alportos sian komputilon, sed ni antaŭvidas, ke ankaŭ aliaj alportos siajn komputilojn. Por ke la kunveno fariĝu sukceso, ni bezonos entute almenaŭ 4 komputilojn.

Cetere, oni povas uzi ankaŭ *tabulkomputilon*, sed bedaŭrinde *Tatoeba* ne uzeblas per poŝtelefonoj.

Bonvolu kunporti

1. Komputilon.
2. Ĵurnalo(j)n.
3. Klasikajn (aŭ modernajn) librojn.

